

& Bonfara Influo de la Alkoholo:

< Ripete 29 sed rekante 24 el 43 batoj por strofo, entute 344 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (o;So /doododo doododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;So doododo dododo SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;h

(#Rekantaĵe: miimimi mire dooTiTi do; reerere reedodo TiLa Ti; doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doododo TiiTiTi do; doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo doodore miirere do;

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Kon/traŭe al mia ĝisnuna kutimo ;
Hieraŭ mi havis bonegan ideon, ; Mi
volas ĝin skribi kun ritmo kaj rimo ;
Por doni al mondo mirindan poemon!

(×:; **Kantu fiere, kantu en ĉen! ; Paŝu surtere, ĝin draŝu jen! ; Kune en rondo ne zorgu pri mondo, tondru la ĝojo en danca la hal'!** ; **Kune en rondo ne zorgu pri mondo, tondru la ĝojo en danca la hal'!**)

'2 Sed sub mia plumo la rimoj forglitis,
; Eĉ unu ne kaptis mi malgraŭ bonvolo,
; Kaj ĉar mia sprito klopode jam ŝvitis,;
Mi provis freŝigi ĝin per alkoholo,

'3 Kaj glason post glaso mi glutis avide
; Ĝis tuta vivigo de l' laca spirito, ; Kaj
rimoj alfluis amase, rapide, ; Memvole
sin donis sen peta invito!

'4 Sed Ritmo hezitis kun tima ŝancelo, ;
Kaj peze trenadis sin lama trokeo, ; Do

– por ĝin olei, el mia botelo ; Mi prenis
buŝplenon da branda oleo!

'5 Kun RitmokajRimo enĝusta metriko
; Nun fluis libere klasika trokeo, ;
Beltakte ondiĝis ĝi kvazaŭ muziko... ;
Subite mihaltis, – ĉar mankis... l' Ideo!!
.....

'6 Sed kie l' Ideo kaŝiĝis, diablo? ;
Miantaŭ momento ĝin tenis ankoraŭ! ;
Ĉu eble ĝi falis kaj kuŝas sub tablo? ;
Ha certe ĝi dronis en mia likvoro!

'7 Mi volis ĝin savi kaj ĝustakomprene
; Mi ĉion eltrinkis laŭ mia kapablo, – ;
Sed kio okazis? – Hodiaŭ matene ;Mi
lace vekiĝis... submia skribtablo...

'8 Pri kio mi verkis hieraŭ vespere? ;
Mi ne plu memoras – Sed jen surpapere
; Ankoraŭ postrestas la grava titolo: ;
"Bonfara Influo de la Alkoholo!"